

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo  
ĵaudon la 22-an de aŭgusto 2024 per Zoom

Ĉeestis Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo.** La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 30-an de majo 2024**

La protokolo de la pasinta kunveno ne estis dissendita de la sekretario. Ni traktos ĝin dum la venonta estrarkunveno.

**3. Norvega Esperantisto kaj la Nacia Biblioteko**

Jardar sendos al la Nacia Biblioteko memorigon pri la retletero, sendita de ni en majo kaj provos aranĝi kun la Nacia Biblioteko akcepteblan kontrakton ene de prudenta tempo.

**4. Norvega Esperantisto**

Sufiĉas materialo ankaŭ por kvara numero en 2024. Ni do eldonu kvar surpaperajn numerojn ĉi-jare, kaj ni krome dissendu ĉiujn numerojn de Norvega Esperantisto ankaŭ rete per la novaĵleteroj.

**5. Vizito al Esperantonia**

Claude kaj Bård informis pri sia vizito al Esperantonia semajnfine 19-20 de julio (rigardu apartan raporton). Ili purigis la ejon, forĵetis kelkajn forĵetindaĵojn kaj ekhavis superrigardon pri la enhavo de la kelo. Vendredon ili kunvenigis tri novajn kursanojn kaj aliajn E-parolantojn de Oslo al interkona kunveno, kiu fariĝis sukcesa. Je posta okazo indus plibonigi la fenestran ekspozicion kaj pendigi ion novan sur la murojn.

**6. Operasjono Dagsverk en Oslo**

Claude planas pasigi tutan semajnon en Oslo fine de oktobro kaj aranĝi labortagon por junuloj en Esperantonia kadre de Operasjono Dagsverk. La laboro konsistos interalie el listigo de libroj, ne prunteblaj en bibsok.no kaj kompletigo de Norvega Esperantisto. NEL pagos 450 kronojn por ĉiu junulo, laboranta por ni kadre de Operasjono Dagsverk.

**7. Peto al Uhlen por Norvega Esperantisto**

Prokrastata.

**8. Plivigliĝo de la retpaĝaro**

Prokrastata.

**9. Stato de la vortaro**

En Trondheim julie okazis kunveno de la vortara komitato en Trondheim. La komitato havas planon pri la maniero administri la listojn de vortoj. Oni provos labori pri la vortaro dum la klubaj kunvenoj. Ŝajne la datumbazo nun ne estas ĝisdata.

**10. Jarraporto**

Ni draste mallongigu la jarraportojn tiumaniere, ke ni nur skribu pri tio, kion ni efektive faris dum la priskribata jaro. Bård verkos resumon pri la jaro 2023 nun, aperigotan pli poste. Rubriko pri novaĵoj de la estraro aperu en ĉiu dua numero de Norvega Esperantisto.

**10. Eventualaĵoj**

Neniu.

**11. Venonta estrara interkonsiliĝo** okazos ĵaudon la 19-an de septembro 2024 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund